**LEGA KOMPRENADO**
**Tasko 1**

**En tiu ĉi tasko vi trovas artikolon kaj sub ĝi 20 frazojn kun asertoj rilataj al la teksto. Decidu, ĉu la enhavo de la frazoj plene kongruas kun la teksto aŭ ne.**
**(Frazo plene kongruas kiam ĉiu ĝia ero kongruas.)**

**Skribu *Jes* aŭ *Ne* en la tabelo ĉe la fino de la tasko.**

*Akireblaj poentoj: 10*

**Akva krizo en *Angkor***

Angkor, unu el la plej ravaj kolektoj de monumentoj kaj ruinoj de temploj en la mondo, protektata de Unesko, altiras kreskantan nombron da turistoj ekde ĝia malfermo antaŭ malpli ol dudek kvin jaroj. Pli ol kvar milionoj da vizitantoj fluis al tiu aparta loko lastan jaron, pezante treege sur la malabundaj akvaj fontoj de la regiono. La templaro de *Angkor*, kun siaj 112 vilaĝoj kaj siaj arbaroj, kaj la najbara urbo *Siem Reap* estas en danĝero fariĝi viktimo de sia sukceso.

La provinco *Siem Reap* perdas ĉirkaŭ 300 milionojn da kubaj metroj da akvo jare. Por subteni ĝian senhaltan disvolviĝon kaj kovri la domajn bezonojn, la Akva Servo de *Siem Reap* devas ĉerpi ĉirkaŭ 27.900 kubajn metrojn da grundakvo tage. La nivelon de la grundakva supraĵo plie minacas la hoteloj kaj aliaj komercoj, kiuj boras kaj pumpas tra la urbo tute kontraŭleĝe por privata uzado. Tiu agado, kies precizan amplekson oni ne scias, minacas la fundamenton de la temploj kaj turoj de *Angkor*. La arĥitekturaj trezoroj estas faritaj por ripozi sur tavolo de sablo, kies firmecon certigas konstanta alfluo de subtera akvo. La malleviĝo de la grundo povus kaŭzi nekalkuleblajn difektojn al la temploj, kiuj kontraŭstaris al kapricoj de la naturo kaj al la konfliktoj dum mil jaroj. La malaltiĝo de la nivelo de la grundo estas daŭra, ankaŭ se oni reŝarĝas la nivelon de la grundakvo.

Turismo respondecas pri pli ol 16% de la Malneta Enlanda Produkto de Kamboĝo kaj ĝi helpis malaltigi malriĉecon en la lando. Kvankam estis provoj malpliigi la nombron de loĝantoj en ĉi tiu regiono, ne estas fareble malhelpi vilaĝanojn el apudaj komunumoj, ke ili havu avantaĝojn pro laborlokoj rilatantaj al turismo, en la provinco *Siem Reap*. Ĉiun jaron, la templaro de *Angkor* altiras pli ol kvar milionojn da vizitantoj, nombro kies kreskadon oni atendas.

Unu el la sugestoj por malpliigi la akvo-problemon estas pumpi akvon el la apuda *Tonle Sap*, la plej granda lago de sud-orienta Azio. Tiu estas unu el la plej signifaj marĉaj ekologiaj sistemoj, pro ĝiaj ununuraj mediaj kvalitoj kaj eksterordinara biodiverseco. Tie oni sukcesis la revivigon de pluraj specoj de endanĝerigitaj birdoj, ekde la protektaj klopodoj komenciĝintaj en 1999. Estas esence por la kamboĝa registaro prijuĝi la efikon al la medio antaŭ ol aprobi iun ajn projekton favore al *Siem Reap*.

La viv-medio, kiu estas ankaŭ la lulilo de la rivero *Tonle Sap* funkcias kiel peranto por la inundoj de la rivero Mekongo. Ĉiujare dum la pluvsezono la nivelo de la akvo en Mekongo leviĝas kaj transfluas en la riveron *Tonle Sap*, kiu anstataŭ eltiri akvon el la lago, kiel ĝi faras dum la seka sezono, estas devigata ŝanĝi sian direkton kaj flui malantaŭen en la lagon. Ĉi tiu jara inundo levas la lagan nivelon de 1 ĝis 1,5 metroj al 8 ĝis 10 metroj, kaj ĝi pliigas ĝian areon kvinoble, ĉar la lago elverŝas sin al la inundita ebenaĵo.

Por solvi la esence gravan demandon de akvo-mastrumado oni devus disponi pri precizaj datumoj pri tiel esencaj informoj, kiel la kvanto de pumpado, la nivelo de la subtera grundakvo kaj la kvoto de ĝia reŝarĝiĝo. La donitaĵoj pri pumpado ebligus precize ekkoni la bezonon je subtera akvo, kaj danke al sistemo de superrigardo de tiuj resursoj en la *Angkor*-zono, averti la pumpejojn kaj la privatajn konsumantojn, kaze de transpaŝo de krizaj sojloj, por ke ili interrompu la elpumpadon ĝis reŝarĝiĝo de la akvoniveloj. Unue oni devus instrui la homojn, ne ĵeti la rubaĵojn en la riveron. Oni povus ankaŭ prizorgi la riveron *Siem Reap* por fari ĝin turisme alloga kaj samtempe zono de daŭrigebla provizado je surfaca akvo.

Lastatempaj esploroj montris, ke la kmeroj, kiuj antaŭ mil jaroj konstruis *Angkoron*, estis majstroj pri akvomastrumado. La kompleksaj akvosistemoj entenis artefaritajn lagojn kaj kanalojn por akcepti kaj direkti pluvakvon kaj konstruitajn rezervujojn por stoki akvon por akvumado, basenojn el laterito, pontojn kaj digojn. La regantoj, kiuj – same kiel administrantoj de niaj modernaj urboj – devis protekti la loĝantojn kontraŭ inundoj dum la pluvsezono, kaj liveri akvon por hejma kaj kampkultura uzado dum la sekaj sezonoj, konstruis sistemon de akvostrukturoj, kiuj subtenis tiun civilizacion dum ses jarcentoj.

1. La alfluo de turistoj donas laboron al la vilaĝanoj, sed malgrandigas la vivterenon de lokaj bestospecioj.
2. Pro la troa kresko de eksterlandaj turistoj, oni provis translokigi indiĝenajn loĝantojn al apudaj vilaĝoj.

3. Oni nepre devas bremsi la kreskon de vizitantoj por certigi la akvokvanton al la loĝantoj de la urbo *Siem Reap*.
4. Pro la alveno de turistoj malkreskis malriĉeco en la regiono, sed oni devas serĉi solvojn por povi kovri la akvobezonon.
5. Pluraj hotelistoj elĉerpas akvon kontraŭleĝe el subteraj fontoj por liveri la necesan akvon al siaj gastoj.
6. La akvo de la proksima rivero bedaŭrinde ne estas uzebla por trinki, pro ĝia poluiteco fare de la turistoj.
7. Se oni senpermese boradas sub la urbo, estas risko, ke miljaraj unikaj konstruaĵoj malstabiliĝos pro la malleviĝo de la grundo.
8. La senĉesa borado kaj pumpado en la urbo estas malagrabla ankaŭ por la turistoj, malgraŭ tio estas atendeble, ke ilia nombro estonte kreskos.
9. La firmecon de la templaro certigas la nivelo de la grundakvo, troviĝanta sub la sablo, kaj la elstara akvomastrumado de la ĝin konstruintaj kimeroj.
10. En la regiono de la templaro malabundas akvo pro manko de necesaj akvofontoj, sekve oni devas reŝarĝi la grundakvon por certigi ties konvenan nivelon.
11. En la proksimeco de la templaro estas pli granda surfaca akvo *Tonle Sap*, de kie oni povus alpumpi la mankantan akvokvanton, sed oni devas pristudi kiel tio tuŝus la naturan ekvilibron.
12. Dum la pluvsezono la surfaco de lago *Tonle Sap* kvinobliĝas, pro kio la templaro kaj la daŭre kreskanta urbo *Siem Reap* povus suferi damaĝojn.
13. Se Unesko nomas ion Monda Heredaĵo tio allogas amason da vizitantoj, endanĝerigante la biodiversecon de la regiono.
14. Pluraj endanĝerigitaj specioj rifuĝis el la regiono de *Siem Reap* al la proksima granda lago *Tonle Sap*.
15. Kiam estas troa akvo en la rivero Mekongo, la rivero *Tonle Sap* fluas al la lago, multobligante ties nivelon.
16. La problemo estas**,** ke foje estas tro da akvo, alifoje maltro, tiun problemon solvis la kmeroj konstruante akvorezervejojn kaj digojn.
17. Malpermesite konstruitaj novaj hoteloj povus havi baldaŭ gravajn malfacilaĵojn, ĉar tavolo de sablo super la grundakvo ne donas sufiĉe firman bazon por ili.
18. La kreskantan problemon de akvomanko oni povus solvi, se finfine rezulte de la kontinua borado kaj pumpado oni trovus akvofonton sub la urbo.
19. Oni devus scii pri la elpumpita akvokvanto kaj daŭre kontroli la grundakvan nivelon, por povi peti la uzantojn ne elĉerpi plian akvon ĝis la necesa reŝarĝiĝo.
20. Se oni elpumpas tro da akvo, la nivelo de la grundakvo malleviĝos, tial oni devas la elprenitan akvon urĝe anstataŭi per pluvakvo aŭ akvo alpumpita el surfacaj fontoj.

| **1.** | **2.** | **3.** | **4.** | **5.** | **6.** | **7.** | **8.** | **9.** | **10.** |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | | | | |

| **11.** | **12.** | **13.** | **14.** | **15.** | **16.** | **17.** | **18.** | **19.** | **20.** |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | | | | | | | | | |

**LEGA KOMPRENADO**
**Tasko 2**

**En la suba teksto mankas dek teksteroj, aparte listigitaj.**
**Elektu por ĉiu spaco la konvenan teksteron, skribu ties listo-literon en la tabelon sub la tasko.**
**Atentu, estas du superfluaj elementoj, kiuj ne kongruas kun la teksto!**
***0 estas ekzemplo por vi.***

*Akireblaj poentoj: 10*

**Renesanca muziko**

Renesanca muziko estas klasika muziko verkita dum la Renesanco, ______0_______. Difini la finon de la periodo estas multe pli facile ol difini la komencon, ______1_______ je la komenco de la 15-a jarcento respondantaj al la subita disvolviĝo de stiloj okaze de la baroka epoko ĉirkaŭ 1600, kaj la ŝanĝiĝado, per kiu muziko akiris ’renesancajn’ trajtojn, estis malrapida.

La pliiĝanta dependado de la intervalo de trito kiel konsonanco estas unu el la pli rimarkeblaj trajtoj de frurenesanca eŭropa arta muziko (en la mezepoko, tritoj estis rigardataj kiel disonancoj). Polifonio, ______2_______, pli kaj pli kompleksiĝis per altgrade memstaraj voĉoj tra la tuta 14-a jarcento; la komenco de la 15-a jarcento montris simpligadon, kaj la voĉoj ofte strebis al glateco. Tio estis farebla______3_______ — en la mezepoko, la malvastaj registroj bezonigis oftajn partokrucojn, kio ankaŭ devigis verki tre multe kontrastantajn partojn.

Ĉirkaŭ la fino de la 15-a jarcento, polifonia sankta muziko (ekzempligita per la mesoj de Ockeghem kaj Obrecht) ankoraŭfoje kompleksiĝis, ______4_______; tion sekvis en la frua 16-a jarcento ankoraŭ alia moviĝo al simpligado, kiel oni povas observi en la verkado de Josquin, kaj poste de Palestrina, kiu tiam enparte reagis al la striktigoj de la Koncilio de Trento malaprobantaj tro kompleksan polifonion ______5_______.

En la malfrua 16-a jarcento, estis kelkaj gravaj, kontrastantaj emoj. En sekulara muziko, aparte en la madrigalo, estis emo al komplekseco kaj eĉ ekstrema kromateco (ekzempligita en la madrigaloj de Luzzaschi, Marenzio, kaj Gesualdo). Dume, komenciĝante en Florenco, okazis klopodo revivigi la dramajn kaj muzikajn formojn de Antikva Grekio, uzante kiel rimedon monodion, ______6_______; pli ekstreman kontraston kontraŭ la antaŭa polifonia stilo estus malfacile trovi; ankaŭ tio estis, almenaŭ je la komenco, sekulara emo. En Venecio, de ĉirkaŭ

1550 ĝis ĉirkaŭ 1610, disvolviĝis impona plurĥora stilo, kiu donis al Eŭropo iom de la plej granda, plej belsona muziko komponita ĝis tiu tempo, pere de pluraj ĥoroj de kantistoj, latunaj blovinstrumentoj, kaj kordinstrumentoj ______7_______ en la Baziliko de Sankta Marko. Tiuj ĉi pluraj revolucioj disvastiĝis tra Eŭropo en la sekvantaj kelkaj jardekoj, komencante en Germanio kaj poste transirante al Hispanio, Francio kaj Anglio iom poste, indikante la komencon de tio, kion oni nun nomas la baroka muzika epoko.

La ĉefaj liturgiaj formoj, ______8_______, estis mesoj kaj motetoj. Aliaj disvolviĝoj okazis ĉirkaŭ la fino, aparte kiam komponistoj de sankta muziko ekadoptis sekularajn formojn (kiel la madrigalon) por siaj propraj celoj. Dum tiu periodo, sekulara muziko atingis pliiĝante larĝan disvastiĝon, kaj montris ampleksan variadon en siaj formoj, sed oni devas esti singardema antaŭ ol subkompreni eksplodon en variado: ______9_______, multe pli da muziko estas konservita el tiu ĉi epoko ol el la antaŭa mezepoko, kaj estas kredinde, ke granda riĉaĵaro de populara muziko el la malfrua mezepoko estas netroveble perdita. Sekulara muziko inkluzivis kantojn ______10_______, formojn kiel la frotolon, la kanzonon, kaj madrigalon, vjolaran muzikon por bekflutoj aŭ gambovjoloj kaj aliaj instrumentoj, kaj dancojn por diversaj ensembloj; kaj ĉirkaŭ la fino de la periodo, la fruajn dramajn antaŭirantojn de opero, ekz. monodio, la madrigala komedio, kaj la intermedio.

a) ĉar okazis neniaj revoluciaj moviĝoj en muzika pensado
b) ĉar presado faris muzikon pli vaste havebla
c) danke al la plifajniĝo de la papero uzata por la manuskriptoj
d) dismetitaj plurloke sub la volboj
e) en maniero respondanta al la okulfrapa detaligo en la tiutempa pentrarto
f) estinte aktuala jam de la 12-a jarcento
g) formon de deklamata muziko super simpla akompano
h) hereditajn pro la karnavaloj
i) kiuj eltenadis tra la tuta Renesanco
j) por unu aŭ multaj voĉoj
k) pro multe plivastigitaj voĉaj registroj en muziko
l) pro ties malhelpado al kompreno de la teksto
***m) proksimume inter 1400 kaj 1600***

| *0.* | 1. | 2. | 3. | 4. | 5. | 6. | 7. | 8. | 9. | 10. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| *m* | | | | | | | | | | |

**LEGA KOMPRENADO**
**Tasko 3**

**Legu la suban tekston kaj kompletigu ĝin helpe de la listo troviĝanta sub la teksto.**
**Por ĉiu mankanta loko vi trovas difinon kaj po 4 radikojn, el kiuj vi devas derivi la ĝustan vorton kaj aldoni la necesajn finaĵojn. (Por derivado uzu prefiksojn aŭ sufiksojn.)**
***0 estas ekzemplo por vi.***

**Ĉiu sence, leksike kaj gramatike ĝusta vorto valoras 0,5 poentojn.**

*Akireblaj poentoj: 10*

**Ata-ita-diskuto ene de la Akademio**

*La fragmento devenas el artikolo de* Carlo Minnaja*, kiu skribis, ke en 1946 okazis profunda reorganizado de la Akademio, kiu troviĝis en relativa ĥaosa stato.* Jan Isbrücker*, (prezidanto inter 1937 kaj 1963) multon faris por reordigi la situacion, sed samtempe akumulis diversajn rolojn kaj povojn.*

… La klopodo limigi la povon de inĝ. *Isbrücker* kaj reguligi la administradon kaŭzis, ke en la Akademio trovis lokon nova batalo, kiu estis origininta aliloke. La disputo estis ĉi-foje, ĉu oni uzu - *is -ata* aŭ *-is -ita* kiam iu ago okazis kaj estas ***kompletiĝinta*** (0) en la pasinteco. Tempesto en akvoglaso: la du uzadoj estis jam de longe kunvivantaj, unu estis uzata de tiuj kiuj sentis pli grava la eĉ momentan _________ (1) de la ago, la alia estis uzata de tiuj kiuj sentis pli grava la finitecon de la ago. La komencan ________(2) kaŭzis la korektado fare de akademiano *Jung*, redaktoro de *Heroldo*, de artikoloj sendataj de akademiano *Lapenna* cele al publikigo. Nu, ĉar temis pri lingvaj sentoj pri tempoj kaj agoj, estas _______ (3) diri "*vi devas senti kiel mi*"; la riĉo de la lingvo permesas esprimi sentojn diversajn. Se pleje maloportunas korektado de artikolo eĉ sen sciigo al la aŭtoro, tamen la afero evoluis al persona malpaco kiu ________ (4) de la du koncernatoj ankaŭ al trupo da aliaj, kiuj preskaŭ dividiĝis en du partioj: la preferantoj de -ata (atistoj) nomis sin "*simetriuloj*" aŭ "*logikistoj*", kaj nomis la aliajn "___________"(5), la preferantoj de -ita (itistoj) nomis sin "*zamenhofanoj*", __________ (6) ke nur ilia uzo akordiĝas kun tiu de *Zamenhof*. Ambaŭflanke, la ___________ (7) vokis aliajn al solidaro ĉe la propra pozicio. Temis, ankaŭ ĉi-foje, pri povodemando. Apud *Lapenna* staris, kun malsameco de ______ (8), la ĉefaj lingvistoj de la movado, de *Kalocsay* al *Waringhien*, de *Régulo Perez* al *Gregor*, kaj, ni diru supraĵe-sinteze kvankam kun esceptoj kiel *Neergaard*, personoj el la okcidenta kaj suda parto de Eŭropo. Apudis al Jung membroj de aliaj teamoj: instruistoj kiel

*Ĉe* kaj *Pragano*, kiuj vidis en nesimetrieco de la participa sistemo malhelpon en la klarigo al klasoj de lernantoj, skandinavianoj kiel *Støp-Bowitz* kaj *Setälä*, __________ (9) kiel *Collinson* aŭ *Vilborg*. [...] Ne mirige, ke la batalo trairis la Akademion, kie sidis ĉepinte *Isbrücker*, flankumanta *Jung*, estro de teknika lernejo, alte estimata en la medio de la urba administrado. *Isbrücker* kaj lia ĉirkaŭaĵo ne rolis en universitato; la *Ĉe-Instituto*, la *Universala Ligo*, la revuo *La Praktiko*, estaĵoj ________(10) sammedie kun centro en Nederlando, kie estis krome *Heroldo*, altiris publikon kiu restadis ekster UEA, al kies potenciĝo kaj tegmenteco *Lapenna* _________ (11). Estis do certa neŝato de la universitatuloj al ĉi alia grupo de ne-lingvistoj, tamen populara siavice.

En la t. n. "*batalo pri ata/ita*" enŝoviĝis do ankaŭ la deziro ŝanĝi la estraron de la Akademio, tiam en la manoj de la atistoj. Kiel ĉiam ĉe balotadoj estis cirkuleroj inter sampartianoj, kiuj difinas strategiojn diversajn; estis kontraŭmetitaj du proponoj por estraro, estis sekretaj decidoj koncentri siajn neojn al tiu difinita kandidato, ktp. En 1963 venkis la estraro proponita de la itistoj, kun *Waringhien* prezidanto; sub li estis proponita, voĉdonita kaj aprobita _________(12), kiu deklaris konforma al la zamenhofa uzo nur la itistan sistemon. Sed la strukturo de aprobo kaj mal- ĉe la Akademio estis tiam, kaj same nun, ekstreme ____________ (13) kaj celanta konservemon: por atingi validecon de voĉdonado necesas, unue, alta __________(14) de partopreno, due, plimulto inter la voĉdonantoj. Tio donas la eblecon al minoritato bloki decidojn kiujn ĝi malaprobas, ĉar la simpla nevoĉdono aldoniĝas al tiuj kelkaj kiuj sisteme ne voĉdonas pro neinteresiĝo, aŭ tiuj kiuj hazarde tiun fojon ne povis doni sian voĉon. Do malplimulto ne povas aprobigi ion, tamen ja sukcesas __________ (15) la situacion kaj malhelpi sukceson de la kontraŭuloj, eĉ se tiuj havas relativan plimulton. Honeste, ne eblas diri, ke la prezentado de la alternativoj estis senpartia: *Warighien* forte insistis pri sia modelo de la interpreto de la participoj apelaciante ne al lingvistikaj sed al moralaj sentoj: fideleco al la *Fundamento* kaj al *Zamenhof*. Eĉ la testofrazoj de la itista sistemo estis prezentataj sub marko "*Z*". La kvorumo de la voĉdonantoj plurfoje ne estis superita pro la nevoĉdona taktiko de la malgajnontoj, kaj la koncernaj rezolucioj sekve kolapsis. La afero do prenis kelke da jaroj, ĝis fina cirkulero de novembro 1967 deklaris definitivajn __________ (16) rezultojn kaj do la demandon pri la participoj unusence respondita laŭ la itista sistemo. La itista partio ŝajnis _________ (17), kaj la prezidanto tute ne kaŝis sian ĝojon pri la malvenko de la kontraŭuloj.

Efektive, triumfis la studado pri la lingvo; okaze de ĉi-kontrasto aperis tre seriozaj, kvankam ofte eksterpentagrame ____________(18), studoj fare de la plej reprezentaj kaj kompetentaj esperantologoj. *Vilborg*, la plej serioza kaj sperta filologo inter la atistoj eldonis altnivelan revuon '*Fokuso*' kiu pluesploris la participan uzadon, post kiam la rezolucio de la Akademio estis depreninta aktualecon al la demando. En 1972 *Jung* ne plu _________ (19) kaj la atista partio, se tiel nomi ĝin, restis sen sia unua kaj ĉefa reprezentanto. Ekregis kompleta paco, kaj ____________(20) oni povus demandi sin, ĉu indis tiom longe, kaj ofte akre, kontrasti. ….

**Difinoj kaj radikoj por krei la solvojn**

0. iĝinta tia, ke al ĝi mankas neniu el la eroj, kiuj devas ĝin konsistigi: *plen-, real-, komplet, fin-;*
1. stato, en kiu io evoluas al pli forta, vastigita aŭ plilaborita formo: *volv-, gajl-, kon-, vast-*;
2. fenomeno, kiu estiĝas inter elektrodoj, apartigitaj de dielektriko sub sufiĉe alta tensio: *fajr-, spark-, fulm-, jon-;*
3. en maniero ofendanta la regulojn de la logiko: *impertinent-, arogant-, indulg-, absurd-*;
4. pligrandiĝi laŭ la longo: *etend-, dilat-, dukti-, volv-;*
5. persono, favoranta gramatikan kategorion, per kiu la lingvoj esprimas la manieron, kiel oni prezentas procezon, ĉu kun limoj (komenco, fino, rezulto …), ĉu sen limoj (daŭro, ripeto): *tens-, modal-, aspekt-, venk-;*
6. postulante ke estu agnoskita rajto pri io: *ordon-, arog-, cert-, pretend-;*
7. ĉefrolulo, tre grava persono: *ĥor-, korife-, ark-, matador-;*
8. grado de la efiko aŭ de karakteriza grando: *intens-, impuls-, intenc-, impet-;*
9. specialisto de etnaro, kiu ekokupis interalie la nordan parton de Eŭropo: *teŭton-, german-, norman-, ĝerman-;*
10. rivoluantaj laŭ fermata kurba linio: *svarm-, orbit-, idl-, akcel-;*
11. energie streĉi la fortojn de la korpo, menso aŭ spirito, por atingi celon: *streb-, aspir-, klopod-, ambici-;*
12. formala opiniesprimo de voĉdonrajta organo aŭ de publika kunveno: *promulg-, dekret-, jurisprudenc-, rezoluci-;*
13. pasiganta multan tempon por fari ion: *lant-, lez-, ramp-, tard-;*
14. minimuma nombro de ĉeestantaj membroj en asembleo, komitato, komisiono ks, necesa por ke ties decidoj estu validaj: *kvot-, kontingent-, koopt-, kvorum-;*
15. fari ion senrezulta, kiel la pozicio de la reĝo en ŝako, kiu, estante la sola peco povanta sin movi, tamen ne povas tion fari sen meti sin en ŝakon: *mat-, arok-, paraliz-, pat-;*
16. per dokumento pruvita identeco, individueco: *aŭtentik-, apokrif-, hipokrit-, legitim-;*
17. brile sukcesi, fieri pri venko*: ovaci-, triumf-, glor-, fanfaron-;*
18. skriba publika diskutado: *polemik-, kontest-, rezon-, diskurs-;*
19. oficiale konigi sian esprimon por akiri sopiratan postenon: *ambici-, iniciati-, kandidat-, abdik-;*
20. rigardante malantaŭen al la pasinta tempo: *prav-, retrospektiv-, prozopope-, aŭgur-;*

**LEGA KOMPRENADO**
**Tasko 4**

**En la subaj tekstoj estas sume 100 vortoj, kies fino mankas.**
**Kompletigu ilin laŭsence.**
**Necesos enskribi tiom da literoj – aŭ je unu pli –, kiom da literoj videblas en la unua parto de la vorto.**

*ekz.: la kato **ku**___ hieraŭ sub la **tap**___ → la kato **kuŝis** hieraŭ sub la **tapiŝo***

*Akireblaj poentoj: 10*

### 1. Eŭropa kunlaboro *'Viva Libera Danuba Ĉielo'*

Ĉiun printempon kaj ĉiun aŭtunon migras milionoj da sovaĝaj birdoj. Laŭ ornitologoj **koli**___ kun elektraj **kondu**___ kaŭzas **alm**___ dudek **elce**___ de mortoj de la **nest**___ populacio. **Fos**___ kaj elektraj **dra**___ estas do **in**___ la grandaj **min**___ kiujn **renk**___ ĉiuj **migr**___ birdoj. Al ĉi **ti**___ riskaj **fakt**___ rilatas **no**___ eŭropa **agad**___ (v. la titolon). Ĝi **prez**___ unikan **ekze**___ de granda **inter**___ kunlaboro **laŭl**___ de tiu grava **mi**___ rivera **kori**___, ripozejo kaj **travi**___ de multaj **spe**___ de birdoj. La **proj**___ estis **lan**___ la 1-an de septembro 2020. Ĝin finance subtenas Eŭropa Unio per 6 636 170 eŭroj.

### 2. Dorsosako plena de rakontoj

En la serio Originala Literaturo eldonita de *Pro Esperanto* unu el la pasintjaraj frandaĵoj estis la komuna volumo de du aŭtoroj: *La dorsosako de Panjo Rut'*. **Verk**____ ĝis nun ne konata en la **espera**____ literaturo: **hun**____ *Sandor J. Bako*, alia jam **bo**____ konata: **sv**____ *Claude Piron* – donas **intere**____ duopon.

**Am**____ aŭtoroj **apar**____ al la tipo de **klas**____ rakontistoj: **il**____ mallongaj **proz**____ facile **sekv**____, kun rekta **temp**____, klaraj **karak**____, plejparte kun **dram**____ finoj. **Ius**____ estas **aser**___ pri iliaj **verkin**___, kion *Bako* **di**____ en sia Antaŭparolo (mem **aŭt**____ novelo): "ne mi, la **vi**____ mem verkis la **rako**____ ". Ilia **verkm**____ do estas **real**____, unuavice **ce**____ ian respeguladon de la vera vivo: "Mi nur konservis ilin sur papero por ke la okazintaĵoj ne malaperu en la nebulo de la forgeso."

**3. Maloportunaĵoj de la cifereca instruado**

En belga ĵurnalo estis publikigita interesa artikolo pri la ĝeneraligo de cifereca instruado en la lernejoj, i.a. pro la korona viruso.

La virtuale **ebli____** interagado **troŝ____** la atenton kaj la **mem____**. Fakuloj **spe____**, ke tiumaniere **stud____** ĝenerale **ler____** malpli **bo____** ol per papera **komun____**. Krome, **kaŝ____** elspezoj **lig____** al la cifereca **tek____** en la lernejo. **Nep____** aĉeti la **apara____** kaj tio estas nur **pa____** de ĉiuj **kos____**. Oni devas **pe____** pri regulaj **ĝisda____** de la diversaj **prog____** kaj pri la rapida **eksmod____** de la aparatoj mem. **Menci____** ankaŭ tio, ke por **prod____** ilin oni **ĉer____** maloftajn **mina____**, ofte **negle____** mediajn **regu____**. Fine, malnovaj komputiloj kutime alvenas en rubo-deponejojn de sudaj landoj.

**4. Venas proverbo el popola la cerbo**

Zamenhof havis du geniajn ideojn: krei internacian lingvon kaj eldoni proverbaron en ĝi. Proverboj **es____** fiksitaj **dir____**, kies **fraz____** kutime ne **anstata____** per aliaj **for____**. Tial ili **pare____** je aliaj **kli____** diraĵoj, **ki____** la sentencoj, la **dev____**, la aforismoj, la **frapf____**. La *Proverbaro* **enh____** ne nur proverbojn en la **malv____** senco, sed **an____** diraĵojn, **ŝabl____**, kreitajn **espr____**. El tiuj mi **list____** nur kelkajn **ekzem____**: „dirite, **far____**", „al la afero!", „**bat____** la venton", „ĉe la **fr____** faro", „**do____** la finofaran **ba____**", „paroli **sense____**", „pafi, **malt____**", „streĉu la **ore____**", „vole-nevole". Tiuj estas ne proverboj sed bele eltrovitaj dirmanieroj, viglaj kaj vivecaj, kiujn uzas ĉiuj verkistoj.

**SKRIBA PRODUKTADO – Tasko 1**

Verku **petleteron** en la nomo de B.T., loĝanto de la Akvoŝparstrato, al la urba aŭtoritato kaj per **argumentoj** petu lin/ŝin rekonsideri sian decidon pri la arboplanta projekto. Provu atingi, ke oni plantu en via strato amelanĉojn anstataŭ magnolioj.

Por via argumentado **legu** la subajn tekstojn kaj **uzu** la ricevitajn informojn pri la ĝisnunaj paŝoj kaj pri la plantoj. *Akireblaj poentoj: 15*

**Via teksto ampleksu 150-200 vortojn.**

K.K. Urbestrejo – Verdurbo 15-08-2021

Estimataj loĝantoj de la Akvoŝparstrato,

Ni informas vin, ke kadre de nia nova projekto, kunlige kun la aktualaj konstrulaboroj por ŝanĝi la malnoviĝintajn kanaltubojn, oni devas forigi en via strato la 12 japanajn ĉerizarbojn kaj anstataŭ ili estos plantitaj novaj arboj. Vi rajtos elekti unu el la sube listigitaj arboj. Laŭ la prefero de la plimulto de la loĝantoj de via strato la urbo plantigos 6 novajn arbidojn ĉe vi.

La elekteblaj arboj estas:

- *amelanĉo (Amelanchier)*
- *sovaĝa pomo (Malus sylvestris)*
- *magnolio (Magnolia)*

Ni petas vin sendi viajn voĉojn al …..

Karolina Kastelo 20a de oktobro 2021
Urbestrejo - Verdurbo

**Komunikaĵo pri la plantotaj arboj.**

Estimataj, laŭ nia ĵus finiĝinta enketo ni konkludis, ke la loĝantoj de via strato elektis magnolio-arbojn, el kiuj ni plantos 6 en via strato en aŭtuno 2022. Dankon pro via kunlaboro ....

Karaj Najbaroj, 2a de novembro 2021

Mi skribas al vi por atentigi vin pri la rezulto de la voĉdonado pri la plantotaj arboj kaj pri la komunikaĵo de la urbestrejo pri tio.

Mi opinias, ke multaj el vi havis konojn nur pri unu el la arboj (magnolio) kaj elektis ĝuste ĝin, sen pli bone pripensi kian medion ni volas ĉirkaŭ ni dum jardekoj, kaj ne nur dum kelkaj semajnoj, sed en ĉiuj sezonoj.

Bonvolu legi la priskribojn de la elekteblaj arboj kaj rekonsideri vian elekton. En okazo de alia rezulto ol estis tiu en oktobro, mi ekagos kaj provos ĉe la urbo aranĝi la ŝanĝojn.

B. T. – loĝanto de Akvoŝparstrato
Al K.K. – Urbestrejo 15a de januaro 2022

Estimata Sinjorino Kastelo,

Mi skribas al vi en la temo de la arboplantado en nia strato.

En la periodo aŭgusto-oktobro la loĝantoj faris sian elekton manke de sufiĉaj informoj pri la elekteblaj arboj. Nun, post mia faka informado, la plimulto de la voĉdonintoj en skriba formo kun nomoj kaj adresoj plenigis novan enketilon laŭ kiu konstateblas, ke nia komunumo ŝanĝis sian elekton (kun rezulto de 90 %) kaj oni rajtigis min peti de vi ŝanĝon de la plano, nome anstataŭ *magnolio* planti en nia strato *amelanĉon*.

Ni petas vin rekonsideri ankaŭ la nombron de la plantotaj arboj, kiu laŭ la nuna plano estas nur la duono de la arboj, kiuj nun beligas nian straton. Atendante vian pozitivan respondon ……

S-ino Karolina Kastelo 21a de januaro 2022
Urbestrejo - Verdurbo
Por B.T. loĝanto de Akvoŝparstrato

Estimata Sinjoro B. T.

Responde al via letero de la 15a de januaro 2022 ni informas vin, ke ne plu eblos ŝanĝi la elekton de la plantotaj arboj en via strato pro du faktoj: unue, ĉar nia sekcio de urboplanado jam komencis la preparlaborojn kaj due ĉar ni volas teni nin al la demokratia proceduro, per kiu la loĝantoj de la strato faris sian elekton en aŭtuno 2021. Ni esperas je via kompreno ….

B.T. por K. Kastelo - Urbestrejo
26a de februaro 2022
**Jen la letero, kiun VI devas skribi.**

***Amelanĉo***

Ĝi havas relative malgrandan mezuron, rondan formon kaj estas somerverda arbusto aŭ arbo.
La planto belas dum la tuta jaro, printempe ĝi riĉas je etaj blankaj florgrapoloj. La foliaro estas pompa en multaj koloroj en la aŭtuno. Ĝiaj etaj bluaj fruktoj, maturiĝantaj en aŭtuno, tre bonas por la birdetoj, sed manĝeblas ankaŭ por homoj.
El la aromaj kaj sukoplenaj fruktoj eblas fari dolĉan marmeladon, kiu havas marcipanan guston kaj entenas valorajn mineralojn.



***Sovaĝa pomo***

Arbaraj, malaltstaturaj (5-10 m) arboj, kun malregula branĉaro kaj mallonga trunko.
Ĝia vivtereno estas plej ofte arbarrandoj. Ĝi plej bone kreskas en humida grundo. La planto ne ŝatas sekecon.
Sur ĝi kreskas 2-4 cm-aj acidgustaj fruktetoj, kiuj longe restas sur la branĉoj kaj estas grava manĝaĵo por la birdoj. La fruktoj havas viglajn flavan, kaj ruĝajn kolorojn. Por homa konsumado eblos fari el ili saŭcojn.



***Magnolio***

Estas genro de arboj kaj arbustoj el Ameriko kaj Azio. Multaj variaĵoj el ili estas kultivataj pro ties grandaj, belaj floroj.
La tre bela arbo floras printempe dum ĉ. unu-du semajnoj. Ĝi estas sufiĉe sentema, ne ĉie enhejmiĝas.
Ĝi bezonas acidan grundon, aliokaze ĝiaj floroj rapide bruniĝas.
La trunko estas malalta, rapide disbranĉiĝanta. La specio, kiu hejmas en Eŭropo, perdas siajn foliojn (kiuj ankoraŭ helverdas) komence de la vintro. Por eviti, ke la planto infektiĝu de fungoj aŭ akaroj, necesas tranĉi ties branĉojn aŭtune.
Ĝiaj fruktoj ne manĝeblas por homoj aŭ bestoj.



**SKRIBA PRODUKTADO**
**Tasko 2**

**En ĉi tiu tasko elektu unu el la du temoj kaj faru la taskon.**

*Akireblaj poentoj: 25*

**Temo 1**

*Nia mondo en mia vivangulo* estas rubriko de via ŝatata esperantlingva reta magazino. Ĝi prezentas temojn **ne kun scienca aliro**, sed tra resumoj de lokaj kontribuantoj pri la ŝanĝiĝo de kutimoj kaj **diversaj rilataj opinioj** kaj **vidpunktoj** de la loĝantoj de la koncerna lando aŭ regiono.

La aktuala temo estas: ***Geedziĝo***

Vi estis petita verki raporton el via loĝ-ĉirkaŭaĵo. En via **sintezo de la publika opiniado** pri la temo prezentu **plurajn trajtojn** kaj **vidpunktojn** kun **ekzemploj** prenitaj de la lando, kie vi vivis iam aŭ vivas nun.

En via artikolo **nepre** traktu la sekvajn subtemojn:

- ŝanĝiĝoj en la prijuĝo de la geedza institucio;
- tradicio kaj moderneco en la geedziĝa ceremonio;
- ŝanĝiĝoj de la geedza vivformo el la ekonomia vidpunkto.

Vi estas libera decidi, laŭ kiu vicordo vi ellaboras tiujn punktojn.

**Via teksto ampleksu 450-500 vortojn.**

**AŬ**

**Temo 2**

Vi estas membro de literatura diskutrondo. Oni petas la membrojn verki **artikolon** pri la rolo de timo en diversaj noveloj. Vi elektis la novelojn *'Tra la loko ensorĉita'* de *Ŝirjaev* kaj *'Kiel Mihok instruis angle?'* de *Baghy*.
En la centro de via analizo estu timo, ties bazo, manifestiĝo, kontraŭbatalo, ŝanĝiĝo.

**Via teksto ampleksu 450-500 vortojn.**

---

La noveloj estis konsulteblaj dum la ekzameno; ilian ligilon la ekzamenatoj ricevis post la aliĝo al la ekzameno.
*'Tra la loko ensorĉita'* de *Ŝirjaev*
*'Kiel Mihok instruis angle?'* de *Baghy*